

## Ĉe La Plaĝo

Verkis Katherine Mansfield; tradukis Brian Fox

### 1

**T**re frumatene. La suno ankoraŭ ne leviĝis, kaj la tuto de Lunarka Plaĝo kaŝiĝis sub blanka mara nebulo. La grandaj arbustaj montetoj, ĉe la fono, kovriĝis. Oni ne povis vidi, kie ili finiĝas, kaj la kampoj kaj bangaloj komenciĝas. La sabla vojo malaperis, kaj la kampoj kaj bangaloj trans ĝi; preter ili ne estis la blankaj dunoj kovritaj per ruĝa greso; estis nenio por montri, kio estis strando kaj, kie estis la maro. Densa roso jam falis. La greso estis blua. Grandaj gutoj pendis sur la arbustoj kaj apenaŭ falis; la arĝenta lanuga kortaderio estis mola sur ĝiaj longaj tigoj; kaj ĉiuj la kalenduloj kaj la diantoj en la domaj ĝardenoj kliniĝis al la tero pro trempo de akvo. Trempitaj estis la malvarmaj fuksioj, rondaj perloj de roso kuŝis sur la plataj folioj de tropeolo. Ŝajne, kvazaŭ la maro kviete supren batiĝis dum la mallumo, kvazaŭ unu granda ondo venis plaŭdi, plaŭdante – ĝis kien? Eble, se oni vekigis dum la nokto, oni vidus grandan fiŝon frapantan ĉe la fenestro kaj tuj forirantan. ...

Aaŝ-aaŝ, sonis la dormema maro. Kaj el la boŝo venis la sono de etaj riveretoj fluantaj, rapide, leĝere, glitantaj inter la glataj ŝtonoj, ŝpruci al filikaj basenoj, kaj ree el ili; kaj ankaŭ estis la plaŭdo de grandaj gutoj sur larĝaj folioj, kaj io alia – kio ĝi estas? – mallaŭta agito kaj tremo, la rompiĝo de tigo, kaj nun tia silento, ke ŝajnis, ke iu aŭskultas.

Ĉirkaŭ la angulo de Lunarka Plaĝo, inter la amasiĝo de frakasita roko, ŝafaro venis piedfrapante. Ili kunpremiĝis, malgranda ŝancelanta lana amaso, kaj iliaj maldikaj bastonaj gamboj rapide antaŭen trotis, kvazaŭ la malvarmo kaj kvieto jam timigis ilin. Malantaŭ ili, maljuna ŝafhundo, kun piedoj trempitaj kaj kovritaj per sablo, kuris tien kun nazo al la tero, sed senzorge kvazaŭ pensi pri io alia. Kaj tiam en la ŝtona portalo, la ŝafisto mem aperis. Li estis magra rekta maljuna viro, en lana jakto, kiu kovriĝis per teksaĵo de gutetoj, velura pantalono ligita sub la genuoj, kaj mola ĉapelo kun blua poŝtuko volvita ĉirkaŭ ties larĝa malneta rando. Unu mano puŝiĝis en lia pantalona zono, la alia mano tenis bele glatan flavan bastonon. Kaj dum li promenis, ne haste, li daŭre mallaŭte leĝere fajfis, aere foran flutadon, kiu sonis malgaje kaj tenere. La maljuna hundo petolis per antikva kapriolo aŭ du, kaj abrupte haltis, honte pri sia ŝercemo, kaj promenis kelkajn dignajn paŝojn apud la flanko de sia mastro. La ŝafaro antaŭen kuris per etaj trotaj impetoj; ili komencis bleki, kaj fantomaj ŝafaroj kaj bovaroj respondis al ili el sub la maro. "Be! Be-e!" Dum kelka tempo ŝajnis, ke ili ĉiam restis sur la sama terpeco. Jen antaŭe etendiĝis la sabla vojo kun malprofundaj flakoj; la samaj trempitaj arbustoj situis ambaŭflanke, kaj la samaj ombraj palisoj. Tiam io grandega vidiĝis, granda hara giganto kun la brakoj etenditaj. Ĝi estis la granda eŭkalipto ekster la butikoj de S-ino Stubbs, kaj, kiam ili preterpasis, ekestis fortaodoro de eŭkalipta oleo. Kaj nun, grandaj punktoj de lumo briletis en la nebulo. La ŝafisto ĉesis fajfi, li frotis sian ruĝan nazon kaj trempitan barbon per sia maniko kaj, celante la okulojn, ekrigardis en direkto al la maro. La suno nun leviĝis. Estis mirinde, kiel rapide la nebulo maldensiĝis, foriri, solviĝi de la mallarĝa ebenaĵo, forruliĝi de la monteta arbustaro, kaj malaperis, kvazaŭ hasti por eskapi; grandaj tordoj kaj volvoj mane puŝis kaj ŝultre ŝovis, iu la alian, dum la arĝentaj faskoj de lumo

plivastiĝis. La fora ĉielo – brile pure blua – speguliĝis en la flakoj, kaj la gutoj, naĝante laŭ la telefonaj fostoj, ekbrilis en punktojn de lumo. Nun la turbula, scintila maro tiom brilis, ke ĝi doloris la okulojn de rigardanto. La ŝafisto prenis el sia brusta poŝo pipon, kies forneto estis tiom eta kiom glano, prove serĉis por bloko de punktita tabako, detranĉis kelkajn rabotaĵojn, kaj plenigis la forneton. Li estis serioza belaspekta maljunulo. Dum li ekfumis, kaj la blua fumo girlandis ĉirkaŭ lia kapo, la spektanta hundo ŝajne fieris pri li.

“Be! Be-e!” La ŝafoj disiris al ventumila formo. Ili apenaŭ preterpasis la somerajn feriantojn, antaŭ ol la unua dormanto turniĝis kaj levis dormeman kapon; ilia blekado sonis en la sonĝoj de etaj infanoj ... kiuj levis siajn brakojn, por malsupren tiri, por karesi la karule etajn lanajn ŝafidojn de dormo. Tiam la unua loĝanto aperis; tio estas Flora, la kato de familio Burnell, sidante sur la pordega fosto, tute tro frue kiel kutime, atendante por ilia melkistino. Kiam ŝi vidis la maljunan ŝafhundon, ŝi rapide rektiĝis, arkigis sian dorson, entiris sian makulan kapon, kaj ŝajne faris etan preciozan tremon. “Aĥ fi! Kia kruda, naŭza besto!” diris Flora. Sed la maljuna ŝafhundo, sen rigardi, svingiĝis preter ĝin, ĵetante ambaŭ flanken siajn krurojn. Nur unu el liaj oreloj tikis por pruvi, ke li vidis, kaj opinias ŝin esti stulta juna ino.

La venteto de mateno pliiĝis en la boŝo, kaj la odoro de folioj kaj malseka nigra grundo miksiĝis kun la akra odoro de la maro. Miriadoj de birdoj kantadis. Ora kardelo flugis super la kapo de la ŝafisto kaj, alte sidis sur tufo, ĝi turniĝis al la suno, kaj taŭzis siajn etajn brustajn plumojn. Kaj nun ili jam preterpasis la kabanon de la fiŝisto, preterpasis la braĝe aspektan maorian kabanon, kie Leila la melkistino loĝis kun sia maljuna avino. La ŝafaro vagis trans flava marĉo kaj Svingo, la ŝafhundo, sekve kunigis ilin, kaj direktis ilin al la pli kruta, pli mallarĝa roka pasejo, kiu kondukis el Lunarka Plaĝo kaj al Tagluma Kreko. “Be! Be-e!” Malforte la bleko venis, dum ili ŝanceliĝis laŭ la rapide sekiĝanta vojo. La ŝafisto formetis sian pipon, faligi ĝin en sian brustan poŝon, ke la eta forneto elpendis. Kaj tuje la mallaŭte leĝera fajfado rekomencis. Svingo kuris laŭ breto de roko por sekvi ion, kio fetoris, kaj reen kuris pro naŭzo. Tiam puŝante, ŝovante, hastante, la ŝafaro ĉirkaŭis la angulon, kaj la ŝafisto sekvis ilin preter vido.

## 2

**P**ost kelkaj momentoj la malantaŭa pordo de unu el la bangaloj malfermiĝis, kaj ulo en larĝe stria naĝvesto, svinge paŝis laŭ la kampo, saltis super la palisajn ŝtupojn ĉe la barilo, hastis tra la tufa greso al en la kavo, stumblis supren laŭ la sabla amaso, kaj kuris kvazaŭ porvive, trans la grandaj poraj ŝtonoj, konkursis trans la malvarma malmola gruzo, kaj sur la firman sablon, kiu brilis kiel oleo. Ŝpliŝ-ŝploŝ! Ŝpliŝ-ŝploŝ! La akvo bobelis ĉirkaŭ liaj gamboj, dum Stanleo Burnell jubile vadis en la maron. La unua persono en la maro, kiel kutime! Li jam denove superis ĉiujn. Kaj li subigis sin por trempi siajn kapon kaj kolon.

“Saluton, frato! Ĉian riverencon, al ci la ĉiopova!” Basa velura voĉo tondre venis trans la akvo.

Hele-ĉiele! Diablo prenu ĝin! Stanleo leviĝis kaj vidis malhelan kapon fore balanciĝe kun brako levita. Jen estis Jonatano Trout – tie antaŭ li! “Estas glora mateno,” kantis la voĉo.

“Jes, tre bone,” diris Stanleo koncize. Kial, aĉe-plaĉe, la ulo ne restis en sia parto de la maro? Kial li venus, trudante en precize ĉi tiun lokon? Stanleo piede puŝis, eksaltis kaj impete kraŭlis. Sed Jonatano egaligis lin. Supren li venis, lia nigra hararo glata sur la frunto, lia mallonga barbo glata.

“Mi eksterordinare sonĝis en lasta nokto,” li kriis.

Kio misas pri la viro? Ĉi manio por konversacio ĝenis al Stanleo preter vortoj. Kaj ĉiam estis same, – ĉiam iu sensencaĵo, pri kiu li sonĝis, aŭ iu idiota ideo, kiun li prenis, aŭ pri iu stultaĵo, kiun li jam legis. Stanleo turniĝis al sia dorso kaj krure plaŭdigis, ĝis li estis viva trombo. Sed eĉ tiam. ...

“Mi sonĝis, ke mi pendas super terure alta klifo, kriante al iu malsupre.”

Vi ja estus, pensis Stanleo. Li ne povis toleri pli de tio. Li ĉesis plaŭdigi. “Atentu al mi, Trout,” li diris, “Mi estas iom hasta ĉi-matene.”

“Vi estas KIA?” Jonatano tiom surpriziĝis – aŭ ŝajniĝis iĝi – ke li sinkis sub la akvo, kaj tiam reaperis blovante.

“Mi nur intencis diri,” respondis Stanleo, “ke mi ne havas tempon por – por – por maldiligenti. Mi volas fini ĉi tion. Mi hastas. Mi ĉi-matene havas laboron farendan. Komprenu?”

Jonatano foriris, antaŭ ol Stanleo finis. “Trairu, amiko,” milde diris la basa voĉo, kaj li forglitis tra la akvo, apenaŭ kun krispo. ... Sed malbenu la ulon! Li jam ruinigis la naĝon de Stanleo. Kia nepraktika idioto la viro estas! Stanleo ree eknaĝis al fora maro, kaj tiam same rapide li male naĝis ĝis la bordo, kaj hastis supren laŭ la strando. Li sentiĝis trompita.

Jonatano restis iom pli longe en la akvo. Li flosis, milde movis siajn manojn naĝile, kaj lasis la maron balanci sian longan malgrasan korpon. Estis kurioze, sed malgraŭ ĉio, li ŝatis Stanleon Burnell. Ĝuste, li demone deziris foje moketi lin, ŝerci pri li, sed funde li kompatis pri la ulo. Estis io mizera, en lia insisto fari taskon el ĉio. Oni ne povas eviti la senton, ke, iun tagon, li maltrafos, kaj tiam kia karambolo okazos al li! Je tiu momento, grandega ondo levis Jonatanon, rajdis preter li, kaj rompiĝis laŭ la strando, per ĝojiga sono. Kia belulo! Kaj nun venis alia. Ĉi tia estas la maniero por vivi – senĉagrene, malprudente, elĉerpi sin. Li stariĝis kaj komencis vadi al la bordo, premante la piedfingrojn en la firman faltan sablon. Por esti trankvila, ne batali kontraŭ la fluso kaj malfluso de vivo, sed por cedi al ĝi – tion oni bezonas. Estas tiu streĉo, kiu ĉiel malĝustas. Por vivo – por vivi. Kaj la perfekta mateno, tiom freŝe kaj bele, ripozi en la lumo, kvazaŭ ĝi ridas al la propra beleco, ŝajnas flustri, “Kial ne?”

Sed nun, kiam li estas ekster la akvo, Jonatano bluiĝis pro malvarmo. Li ĉie suferas doloron. Estis kvazaŭ, iu eltordis la sangon el li. Kaj promenante supren laŭ la strando, tremante, ĉiuj muskoloj streĉaj, ankaŭ li sentiĝis, ke la naĝo ruiniĝis. Li jam naĝe restis tro longe.

### 3

**B**erila estis sola en la salono, kiam Stanleo aperis; li portis bluan serĝan kompletan, rigidan kolumon kaj punktitan kravaton. Li aspektis preskaŭ mistere pura kaj broŝita; li iros al la urbo por la tago. Eksidante en sian seĝon, li elprenis sian horloĝeton kaj metis ĝin apud sian teleron.

“Mi havas nur dudek kvin minutojn,” li diris. “Vi eble irus por sciigi, ĉu la avena kaĉo jam pretiĝas, Berila?”

“Patrino ĵus iris por venigi ĝin,” diris Berila. Ŝi sidiĝis ĉe la tablo, kaj elverŝis lian teon.

“Dankon!” Stanleo ektrinketis “Hola!” li diris per surprizita voĉo, “vi forgesis la sukeron.”

“Ho, bedaŭras!” Sed eĉ tiam Berila ne helpis lin; ŝi puŝis la sukerojn al li. Kion tio signifas? Dum Stanleo servis sin, liaj bluaj okuloj pli atentis; ili ŝajnis tremi. Li rapide ekrigardis sian bofratinon kaj dorsen kliniĝis.

“Nenio misas, ĉu?” li senzorge demandis, fingrumante sian kolumon.

La kapo de Berila kliniĝis; ŝi turnis sian teleron en siaj fingroj.

“Nenio,” diris ŝia leĝera voĉo. Tiam ankaŭ ŝi levis siajn okulojn, kaj ridetis al Stanleo. “Kial, ĉu ja estu?”

“Ho-ho! Neniu ajn kialo, laŭ mia kono. Mi opiniis, ke vi ŝajnis iom –”

Je tiu momento la pordo malfermiĝis kaj la tri etaj knabinoj aperis, kaj ĉiu portis bovlon de kaĉo. Ili same vestiĝis per bluaj ĵerzoj kaj kulotoj; iliaj brunaj gamboj estis nudaj, kaj ĉies hararo plektita kaj tenita supren en ponea vosto. Post ili venis S-ino Fairfield kun la pleto.

“Zorge, infanoj,” ŝi avertis. Sed ili jam treege zorgis. Ili ŝatis permeso porti aĵojn. “Ĉu vi jam diris bonan matenon al via patro?”

“Jes, Avinjo.” Ili sidiĝis sur la benko, kontraŭ Stanleo kaj Berila.

“Bonan matenon, Stanleo!” Maljuna S ino [S-ino] Fairfield donis lian bovlon al li.

“Matenon, patrino! Kiel la knabo fartas?”

“Grandioze! Li nur vekiĝis unufoje lastan nokton. Kia perfekta mateno!” La maljunulino paŭzis, kun sia mano sur la bulo de pano, por spekti el la malferma pordo en la ĝardenon. La maro sonis. Tra la tute malferma fenestro, la suno fluis sur la flavajn vernisajn murojn kaj nudan plankon. Ĉio sur la tablo ekbrilis kaj scintilis. En la centro estis malnova salatujo plene [plena] de flavaj kaj ruĝaj floroj de tropeolo. Ŝi ridetis, kaj aspekto de profunda kontento brilis en ŝiaj okuloj.

“Vi eble tranĉos pecon de tiu pano por mi, patrino,” diris Stanleo. “Mi havas nur dek unu kaj duonan minutojn, antaŭ ol la aŭtobuso trapasos. Ĉu iu jam donis miajn ŝuojn al la servistino?”

“Jes, ili estas pretaj por vi.” S-ino Fairfield estis tute trankvile.

“Ho, Kezia! Kial vi estas tia malorda infano!” Berila malespere kriis.

“Mi, onklino Berila?” Kezia fikse rigardis ŝin. Kion ŝi ĉi-foje faris? Ŝi nur fosis riveron tra la mezo de sia kaĉo, plenigis ĝin, kaj nun formanĝas la bordojn. Sed ŝi faris tion ĉiumatene, kaj neniu plendis ĝis nun.

“Kial vi ne povas ĝuste manĝi vian nutraĵon, kiel Isabela kaj Ĉarlota?” Kiel maljuste plenkreskuloj estas!

“Sed Ĉarlota ĉiam faras flosantan insulon, ĉu ne, Ĉarlota?”

“Mi ne faras,” Isabela abrupte diris. “Mi nur aspergas sukeron sur mian, verŝas lakton, kaj finas. Nur beboj ludas per sia manĝaĵo.”

Stanleo forpuŝis sian seĝon kaj stariĝis.

“Ĉu vi alportus tiujn ŝuojn por mi, patrino? Kaj Berila, se vi finiĝis, mi deziras, ke vi hastu al la vojo kaj haltigu la diliĝencon. Kuru al via patrino, Isabela, kaj

demandu, kien oni metis mian bulĉapelon. Atendu momenton – ĉu vi, infanoj, ludis per mia bastono?”

“Ne, patro!”

“Sed mi metis ĝin ĉi tien.” Stanleo komencis tempeste paroli. “Mi klare memoras, ke mi metis ĝin en ĉi tiun angulon. Nun, kiu prenis ĝin? Ne estas tempo por malŝpari. Viglu! Oni devas trovi la bastonon.”

Eĉ Alica, la servistino, tiriĝis en la serĉon. “Vi ne uzis ĝin por inciti la kuirejan fajron, eble, ĉu?”

Stanleo impetis al la dormĉambro, kie Linda kuŝas. “Tre eksterordinara afero. Mi ne povas reteni eĉ unu posedaĵon al mi mem. Oni forprenis mian bastonon, nun!”

“Bastonon, kara? Kian bastonon?” Stanleo decidis, ke la malklareco de Linda, en ĉi tiuj okazoj, ne povis esti reala. Ĉu neniu kompatus al li?

“Diliĝenco! Diliĝenco!” la voĉo de Berila kriis de voja pordego.

Stanleo svingis sian brakon al Linda. “Neniu tempo por diri adiaŭon!” li kriis. Kaj li intencis, ke tio estu puno al ŝi.

Li ekprenis sian bulĉapelon, hastis el la domo, kaj paŝegis laŭ la ĝardeno pado. Jes la diliĝenco estis tie, atendante, kaj Berila, apoge sur la malferma pordego, ridas supren al iu aŭ alia, kvazaŭ nenio okazis. La senkompata sinteno de virinoj! La maniero, en kiu ili senpense akceptis, ke estas onia tasko daŭre sklavi por ili, dum ili ne eĉ zorgis por certigi, ke onia bastono ne perdiĝu. Kelly tiris la vipon trans la ĉevalojn.

“Adiaŭ, Stanleo,” vokis Berila, dolĉe kaj gaje. Estis sufiĉe facile diri adiaŭon! Kaj tie ŝi staris, senokupe, ŝirmante siajn okulojn per mano. La terura parto estis, ke Stanleo devas ankaŭ voki adiaŭon, pro ŝajnigo. Tiam li vidis ŝin turniĝi, salteti, kaj rekuri al la domo. Ŝi ĝojis esti libera de li!

Jes, ŝi estis dankema. En la salonon ŝi kuris, kaj kriis, “Li jam foriras!”

Linda kriis de sia ĉambro, “Berila! Ĉu Stanleo foriris?” Maljuna S-ino Fairfield aperis, portante la knabon en lia eta flanela jako.

“Foriris?”

“Foriris!”

Ho, la malŝarĝo, la diferenco, kiu okazas, kiam la viro estas ekster la domo. Iliaj voĉoj mem ŝanĝiĝis dum ili vokis iu al alia; ili sonis varmaj kaj amemaj, kaj kvazaŭ ili kunhavis sekreton. Berila transiris al la tablo. “Prenu pluan tason da teo, patrino. Ĝi ankoraŭ varmas.” Ŝi volis iel festi, ke nun ili povas fari kion ajn, ili deziras. Estis neniu viro por perturbi ilin; la tuta perfekta tago estis ilia.

“Ne, dankon, filino,” diris maljuna S-ino Fairfield; sed la maniero en kiu ŝi, tiu-momente, supren ĵete ŝancelis la knabeton, kaj diris, “a-gu a-gu a-ga!” al li, signifis, ke ŝi same sentiĝis.. La etaj knabinoj kuris en la kampon; kiel kokinoj, lasitaj el sia kokinejo.

Eĉ Alica, la servistino, lavante la vazojn en la kuirejo, estis trafita per la infekto kaj uzis la valoran rezervujan akvon, tute sendisipline.

“Ho, ĉi viroj!” diris ŝi; kaj ŝi puŝis la tekruĉon en la pelvon kaj tenis ĝin sub la akvo eĉ, post kiam ĝi ĉesis bobeli, kvazaŭ ankaŭ ĝi estas viro, kaj dronado estas tro bona por li.

## 4

"Atendu por mi, Isabela. Kezia, atendu por mi." Tie estis kompatinda Ĉarlota, oni ree postlasis ŝin, ĉar estis treege malfacile por ŝi, sole grimpi super la barilajn ŝtupojn.

Kiam ŝi staris sur la unua palisa ŝtupo, ŝiaj genuoj ekŝancelis; ŝi ekprenis la palison. Tiam oni devas meti unu gambon trans la barilon. Sed kiun gambon? Ŝi neniam povis decidi. Kaj, kiam ŝi fine transmetis unu gambon per ia malespera stamfo – tiam, la sento estis terura. Ŝi duone estis ankoraŭ en la kampo, kaj duone en la tufa greso. Ŝi senespere kaptis la palison, kaj levis sian voĉon, "Atendu por mi!"

"Ne, oni ne atendu por ŝi, Kezia," diris Isabela. "Ŝi estas tia eta stultulo. Ŝi ĉiam fuŝe-buŝe plendas. Venu!" kaj ŝi tiris la ĵerzon de Kezia. "Vi rajtos uzi mian sitelon, se vi venas kun mi," ŝi afable diris. "Ĝi estas pli granda ol via." Sed Kezia ne povis lasi, ke Ĉarlota restu sole. Ŝi rekuris al ŝi. Ĝis tiu tempo la vizaĝo de Ĉarlota estis ruĝa, kaj ŝi anhele spiris.

"Ĉi tie, transmetu vian alian piedon," diris Kezia.

"Kie?"

Ĉarlota rigardis malsupren al Kezia, kvazaŭ de monta alteco.

"Ĉi tie, kie mia mano estas." Kezia frapis la lokon.

"Ho, ĉu 'tie' vi intencas!" Ĉarlota funde suspiris, kaj transmetis la duan piedon.

"Nun – iel ĉirkaŭ turnu, kaj sidiĝu kaj glitu," diris Kezia.

"Sed estas nenio, *sur* kio mi sidu, Kezia," diris Ĉarlota.

Ŝi fine sukcese traktis ĝin, kaj, kiam ĝi finiĝis, ŝi skuis sin, kaj vizaĝe brilis.

"Mi pliboniĝas pri grimpadado super palisajn ŝtupojn, ĉu ne, Kezia?"

Ĉarlota havis tre espereman naturon.

La ruĝeta kaj blua kufoj sekvis la brile ruĝan kufon de Isabela, supren laŭ tiu glitiga dekliva monteto. Ĉe la supro, ili paŭzis por decidi kien iri kaj por observi tiujn, kiuj jam estis tie. Se oni rigardis de malantaŭe, tiuj staris kontraŭ la horizonto, ege gestis per siaj ŝpatoj, kaj aspektis kiel etaj perpleksigitaj esploristoj.

La tuta familio de Samuelo Josephs jam estis tie, kun ilia helpistino, kiu sidis sur tenda tabureto, kaj tenis ordon per fajfilo, kiun ŝi portis ĉirkaŭ sia kolo, kaj bastono, per kiu ŝi direktis agadojn. La familio Josephs neniam ludis inter si aŭ regis sian propran ludon. Se ili ja faris tion, antaŭ la fino, la knaboj verŝis akvon en la kolumojn de la knabinoj, aŭ la knabinoj provis meti etajn nigrajn krabojn en la poŝojn de la knaboj. Do, S-ino S-J kaj la kompatinda helpistino ĉiumatene kompilis, kion ili nomis programon, por amuzi ilin kaj eviti petoladon. La tuto estis konkurso aŭ kurado aŭ rondira ludo. Ĉio komenciĝis per pike laŭta blovo tra la helpistina fajfilo, kaj finiĝis per alia. Eĉ estis premioj – grandaj, iom malpuraj paperaj pakaĵoj, kiujn la helpistino tiris el ŝvela reta sako, kun acida rideto. La familio Samuelo Josephs treege batalis por la premioj, kaj friponis kaj ili pinĉis la brakojn de aliaj – ili ĉiuj estis spertaj pinĉantoj. La solan fojon, kiam la infanoj Burnell ludis kun ili, Kezia gajnis premion, kaj, kiam ŝi malligis tri pecojn de papero, ŝi trovis etan rustan butonan kroĉilon. Ŝi ne povis kompreni, kial ili tiom ekscitiĝis. ...

Sed nun ili neniam ludis kun la familio Samuelo Josephs, aŭ eĉ ĉeestis ties festojn. La familio Josephs ĉiam regalis per infanaj festoj ĉe Lunarka Plaĝo, kaj ĉiam estis la sama manĝaĵo: granda pelvego de bruna frukta salato, bulkoj kvarone tranĉitaj, kaj granda kruĉo plena de io, kio, laŭ la helpistino, nomiĝas "limonado kara". Kaj tiun vesperon, oni hejmen iras kun duono de la krispo ŝirita de sia robo, aŭ kun io verŝita sur la antaŭo de sia brodita antaŭtuko, kaj lasante la anojn de familio Josephs saltantaj kiel sovaĝuloj sur ties gazono. Ne! Ili estis tro teruraj.

Ĉe la alia flanko de la strando, proksime al la akvo, du etaj knaboj kun siaj kulotoj supren rulite, trembrilis kiel araneoj. Unu fosis, la alia trotis en kaj el la akvo, plenigi etan sitelon. Ili estis la knaboj Trout, Filipino kaj Ĉifono. Sed Filipino tiom okupiĝis pri fosado, kaj Ĉifono tiom okupiĝis pri helpado, ke ili ne vidis siajn etajn kuzinojn, ĝis kiam ili estis tre proksimaj.

"Rigardu," diris Filipino. "Vidu, kion mi malkovris." Kaj li montris, al ili, malnovan, malsekan boton, kiu aspektis preme misformita. La tri etaj knabinoj fiksrigardis.

"Kion ajn vi faros per ĝi?" demandis Kezia.

"Retenu ĝin, kompreneble," Filipino tre malestimis ŝin. "Ĝi estas trovaĵo - komprene?"

Jes, Kezia komprenis tion. Tamen ... .

"Estas multaj aĵoj kaŝitaj en la sablo," eksplikis Filipino. "Ili ĵetiĝas el pereintaj ŝipoj. Nu - vi ja eble trovos -."

"Sed, kial Ĉifono devas daŭre enverŝi akvon?" demandis Ĉarlota.

"Ho, tio estas por malsekigi ĝin," diris Filipino, "por iom plifaciligi la laboron. Daŭrigu tion, Ĉifono."

Kaj bona eta Ĉifono kuris, tien kaj reen, verŝante akvon, kiu iĝis bruna kiel kakao.

"Jen, ĉu mi montru al vi tion, kion mi hieraŭ trovis" mistere diris Filipino, kaj li ŝovis sian ŝpaton en la sablon. "Promesu, ke vi ne diros al iu ajn.

Ili promesis.

"Diru: 'kruci mian koron, rekte aŭtentike'."

La etaj knabinoj diris ĝin.

Filipo prenis ion el sia poŝo, longe tempe frotis ĝin sur sia ĵerzo, tiam spiris sur ĝin, kaj ree frotis ĝin.

"Nun ĉirkaŭ turniĝu." li ordonis.

Ili ĉirkaŭen turnis sin.

"Ĉiuj rigardu same direkten. Restu senmove. Nun!"

Kaj lia mano malfermiĝis; li montris en la lumo ion, kio flagris, kio trembrilis, kio estis ia tre bela verdo.

"Ĝi estas smeraldo," solene diris Filipino.

"Ĉu ĝi vere estas, Filipino?" Eĉ Isabela impresiĝis.

La aminda verda aĵo ŝajne dancis en la fingroj de Filipino. Onklino Berila posedis smeraldon en ringo, sed ĝi estis tre malgranda. Ĉi tiu estis tiom granda kiom stelo, kaj multe pli bela.

## 5

**D**um la mateno etendiĝis, tutaj grupoj aperis trans la sablaj montetoj, kaj venis al la strando por naĝi. Oni komprenis, ke je la dek-unua, la inoj kaj infanetoj de la somera kolonio sole utiligis la maron. Unue la virinoj malvestis, surmetis siajn naĝvestojn, kaj kovris siajn kapojn sub malbelegaj naĝĉapoj, simile al spongaj sakoj; tiam oni malvestis la infanojn. La strando disŝutiĝis per etaj amasoj de vestoj kaj ŝuoj. La grandaj someraj ĉapeloj surhavis ŝtonojn por ne forbloviĝi, kaj aspektis kiel grandegaj konkoj. Estis strange, ke eĉ la maro ŝajne sonis malsame, kiam ĉiuj tiuj saltantaj, ridantaj figuroj kuris en la ondojn. Maljuna S-ino Fairfield, en pale viola kotona robo, kaj nigra ĉapelo ligita sub la mentono, kunigis sian idaron kaj pretigis ilin. La knaboj Trout, detiris siajn ĉemizojn super siajn kapojn, kaj foren la kvin rapidis; dum ilia avino sidis kun unu mano sur sia trikada sako, preta por eltiri bulon de lano, kiam ŝi certis, ke ili ja estis en la maro.

La kompakte etaj knabinoj, ne eĉ duone kuraĝis, kiom la delikataj, mole aspektaj, etaj knaboj. Filipino kaj Ĉifono, malvarme tremante, kaŭrante, frapante la akvon, neniam hezitis. Sed Isabela, kiu povis naĝi tra dek-du tiroj, kaj Kezia tra preskaŭ ok; sekvis, nur se ĉiuj strikte komprenu, ke oni ne surŝprucigus ilin. Pri Ĉarlota, ŝi tute ne sekvis. Ŝi ŝatis lasite eniri la akvon siamaniere, bonvolu. Kaj tiu maniero, estis sidiĝi ĉe la rando de la akvo, kun rektaj kruroj, genuoj kune premitaj, kaj fari ne precizajn movojn per la brakoj, kvazaŭ ŝi atendis, ke ŝi ŝvebos al la maro. Sed kiam ondo, pli granda ol kutime, ia ŝaŭmanta ondo, venis galopante en ŝia direkto, ŝi grimpe stariĝis kun horora mieno, kaj reflugis supren laŭ la strando.

“Jen, patrino, tenu tiujn por mi, ĉu vi [bonvole?”

Du ringoj kaj maldika ora ĉeno, oni faligis en la sinon de S-ino Fairfield.

“Jes, kara. Sed ĉu vi ne naĝos ĉi tie?”

“Ne-ne,” Berila trene diris. Ŝi ŝajnis malpreciza. “Mi malvestos pli malproksime laŭ la strando. Mi naĝos kun S-ino Henriko Kember.”

“Tre bone.” Sed la lipoj de S-ino Fairfield fiksas. Ŝi malaprobis pri S-ino Henriko Kember. Berila sciis tion.

Kompatinda maljuna patrino, ŝi ridetis, dum ŝi tanĝis trans la ŝtonojn. Kompatinda maljuna patrino! Maljuna! Ho, kia ĝojo, kia feliĉo esti juna. ...

“Vi aspektas tre kontenta,” diris S-ino Henriko Kember. Ŝi sidis sur la ŝtonoj, ĝibiĝe kun brakoj ĉirkaŭ la genuoj, fumante.

“Estas tiel rava tago,” diris Berila, ridetante malsupren al ŝi.

“Ho, mia *kara!*” La voĉo, de S-ino Henriko Kember, sonis kvazaŭ ŝi sciis pli bone ol tiel. Sed nu, ŝia voĉo ĉiam sonis, kvazaŭ ŝi sciis ion pli bone pri oni, ol oni mem sciis. Ŝi estis longa, strange aspekta virino, kun mallarĝaj manoj kaj piedoj. Ankaŭ ŝia vizaĝo estis longa kaj mallarĝa kaj aspektis elĉerpita; eĉ ŝia blonda bukla franĝo aspektis elĉerpita kaj velkinta. Ŝi estis la sola virino ĉe Lunarka Plaĝo, kiu fumas, kaj ŝi fumis senĉese. Ŝi tenis la cigaredon inter siaj lipoj dum ŝi parolis, kaj elprenis ĝin, kiam la cindro estis tiom longa, ke oni ne komprenas, kial ĝi ne falas. Kiam ŝi ne ludas briĝon – kaj ŝi ludis briĝon en ĉiu tago de sia vivo – ŝi pasigis sian tempon kuŝante sub la tuta brilo de la suno. Ŝi povis toleri iom ajn de ĝi; ŝi neniom havis sufiĉon. Tamen, ĝi ŝajne ne varmigis ŝin. Sekigite, velkinte, malvarme ŝi etende kuŝis sur la ŝtonoj, kiel peco de

surĵetita flosligno. La virinoj ĉe Lunarka Plaĝo opiniis, ke ŝi estis tre malĉasta. Ŝia manko de vanto, ŝia slango, la maniero, en kiu ŝi traktis virojn, kvazaŭ ŝi estis unu el ili, kaj ke ŝi ne fieris pri sia domo kaj, ke ŝi nomis 'Gladistino' al sia servistino, Gladisa, estis hontinda.. Starante sur la verandaj ŝtupoj, S-ino Kember vokus, per sia apatie laca voĉo, "Ho jen, Gladistino, eble vi ĵetos al mi poŝtukon, se mi posedas iun, ĉu ja?" Kaj Gladistino, kun ruĝa banto en sia hararo anstataŭ kufo, kaj blankaj ŝuoj, venis kurante kun impertinenta rideto. Estis absoluta skandalo. Verdire, ŝi ne havis infanojn; kaj ŝia edzo! ...Tiam la voĉoj ĉiam altiĝis; ili fariĝis fervoraj. Kiel li povus geedziĝi kun ŝi? Kiel li povis, kiel li povas? Ĝi devis esti mono, kompreneble, sed eĉ tiam!

La edzo de S-ino Kember estis pli juna ol ŝi, je almenaŭ dek jaroj, kaj tiel nekredeble bela, ke li aspektis kiel masko, aŭ perfekta ilustraĵo en usona romano, anstataŭ viro. Nigra hararo, bluegaj okuloj, ruĝaj lipoj, malrapida dormema rideto, sperta tenisisto, perfekta dancanto, kaj kun ĉio, estis ia mistero. Henriko Kember estis kiel viro promenante dum sia dormo. Viroj ne povis toleri lin, ili ne povis tiri konversacion el la ulo; li ignoris sian edzinon, same kiel ŝi ignoris lin. Kiel li vivis? Kompreneble, estis diraĵoj, sed kiaj diraĵoj! Oni simple ne povis rakonti ilin. La virinoj, kun kiuj oni vidis lin, la lokoj, kie oni vidis lin ... sed nenio iam estis certa, nenio difina. Luj el la virinoj ĉe Lunarka Plaĝo private pensis, ke iun tagon li murdos. Jes ja, eĉ dum ili parolis kun S-ino Kember kaj vidis la teruran kunmiksaĵon, kiun ŝi portis, ili vidis ŝin etenditan dum ŝi kuŝis sur la strando; sed malvarman, sango-verŝitan, kaj ankoraŭ kun cigaredo fiksita en la angulo de ŝia buŝo.

S-ino Kember stariĝis, oscedis, malkroĉis sian bukon, kaj tiris al la bendo de sia bluzo. Kaj Berila paŝis el sia jupo kaj forigis sian ĵerzon, kaj ekstaris en sia mallonga blanka subjupo, kaj sia kamizolo kun bendaj bantoj sur la ŝultroj.

"Kompatu nin," diris S-ino Henriko Kember, "kia eta belulino vi estas!"

"Neniom diru," kviete diris Berila; sed, fortiris unu ŝtrumpon kaj tiam la lian, ŝi sentis sin eta belulino.

"Mia kara - kial ne?" diris S-ino Henriko Kember, paŝante sur sia propra subjupo. Vere - ŝiaj subvestoj! Blua kotona kalsono kaj lina korsaĵo, kiu iel memorigas onin pri kapkusena tego. ... "Kaj vi ne portas bartojn, ĉu ja?" Ŝi tuŝis la talion de Berila.

Kaj Berila risorte forsaltis kun eta emocia krio. Tiam ŝi firme diris, "Neniam!"

"Bonŝanca, eta ulino," suspiris S-ino Kember, malligante sian propran korseton.

Berila turnis sian dorson, kaj komencis la komplikajn movojn de iu, kiu provas forpreni siajn vestojn, kaj samtempe surmeti sian naĝveston.

"Ho mia kara - ne zorgu pri mi," diris S-ino Henriko Kember. "Kial esti sinĝena. Mi ne manĝos vin. Mi ne ŝokiĝos, kiel tiuj aliaj simpluloj." Kaj ŝi faris sian strange henan ridon, kaj grimacis al la aliaj virinoj.

Sed Berila ja estis sinĝena. Ŝi neniam malvestis antaŭ iu ajn. Ĉu tio estas stulta? S-ino Henriko Kember sentigis ŝin, ke ĝi ja estis stulta, eĉ io hontinda. Kial ĝeni sin, vere ja! Ŝi rapide ekrigardis sian amikinon starantan tiel aŭdace en sia ŝirita ĉemizo, kaj ekbruligantan novan cigaredon; kaj rapide aŭdace malica sento ekis en ŝia brusto. Ridante senbride, ŝi surmetis la molan sablan palpan naĝveston, kiu ne tute sekiĝis, kaj fiksita la tordajn butonojn.

“Tio pli bonas,” diris S-ino Henriko Kember. Ili kune ekiris malsupren laŭ la strando. “Vere, estas peko, ke vi portas vestojn, mia kara. Iu devos diri tion al vi, iun tagon.” La akvo estis iom varma. Ĝi estis tiu mirinde travidebla bluo, arĝente punktita, sed la sablo ĉe la fundo aspektis ora, kiam oni frapis ĝin per piedfingroj, eta nubo de ora polvo leviĝis. Nun la ondoj atingis ĝis ŝia brusto. Berila staris, la brakoj etenditaj, por elrigardi, kaj, kiam ĉiu ondo alvenis, ŝi ete saltis tiel, ke ŝajnas, kvazaŭ estis la ondo, kiu milde levis ŝin.

“Mi opinias, ke belaj fraŭlinoj rajtas bone ĝui sin,” diris S-ino Henriko Kember. “Kial ne? Ne eraru, mia kara. Amuzu vin.” Kaj subite ŝi renversiĝis, malaperis, kaj rapide fornaĝis, rapide kiel rato. Tiam ŝi ĝiris sin, kaj komencis reen naĝi. Ŝi intencis diri ion plu. Berila sentis, ke tiu malvarma virino venenas ŝin, sed ŝi sopiris aŭdi. Sed ho, kiel strange, kiel terure!

Dum S-ino Henriko Kember proksimiĝis, ŝi aspektis, en sia nigra akvo-imuna naĝĉapo, kun dormema vizaĝo levita super la akvo, nur la mentono tuŝanta, kiel horora karikaturo de sia edzo.

## 6

**E**n ferdekseĝo, sub manuka arbo, kiu kreskis en la centro de la antaŭa gazono, Linda Burnell forrevis la matenon. Ŝi faris nenion. Ŝi rigardis supren, al la malhelaj densaj sekaj folioj de la manuka arbo, al la fendetoj de bluo inter ili, kaj de tempo al tempo, eta flava floro falis sur ŝin. Beleta – ja, se oni tenus unu el tiuj floroj sur la polmo de la mano kaj atente rigardus tion, ĝi estus rave eta aĵo. Ĉiu pale flava petalo brilis kvazaŭ ĉiu estis la zorga metio de amanta mano. La eta lango en la centro donis al ĝi la formon de sonorilo. Kaj kiam oni renversas ĝin, la ekstero estas dense bronza koloro. Sed tuj post flori, ili falis kaj disiĝis. Oni brosis ilin for de sia robo dum oni parolis; la abomenaj etaj aĵoj kaptiĝis en sia hararo. Kial do, iam ajn flori? Kiu pasigas la ĝenon – aŭ la ĝojon – por fari ĉiujn aĵojn, kiuj estas malŝparitaj, malŝparitaj? ... Estis nekredeble.

Sur la gazono apud ŝi, kuŝante inter du kapkusenoj, estis la knabo. Profunde dormante li kuŝis, kun kapo turnite for de sia patrino. Lia fajna malhela hararo aspektis pli kiel ombro ol reala hararo, sed lia orelo estis brile profunde korala koloro [havis brile profunde koralan koloron]. Linda kunpremis siajn manojn super sia kapo, kaj krucis siajn krurojn. Estis plezure scii, ke ĉiuj ĉi bangaloj estis neokupitaj, ke ĉiuj estis malsupre sur la strando, el vido, el aŭdo. Ŝi havis la ĝardenon nur por si mem; ŝi estis sola.

Blindume blanke la diantoj brilis; la ore-okulaj kalenduloj scintilis; la tropeoloj girlandis, per verda kaj ora flamoj, sur la stangoj de la verando. Se oni nur havus tempon por sufiĉe longe rigardi tiujn florojn, tempon por preterpasi la sensoron de noveco kaj strangeco, tempon por koni ilin! Sed tuj, kiam oni paŭzas por apartigi la petalojn, por malkovri la dorsan flankon de la folio, tien alvenas Vivo, kaj oni estas foren balaita. Kaj kuŝante en sia kana seĝo, Linda sentiĝis tiom malpeza; ŝi sentiĝis kiel folio. Tien alvenis Vivo kiel vento kaj ŝi kaptiĝis, kaj skuiĝis; ŝi devis iri. Ho ve, ĉu ĉiam tiel estus? Ĉu estus nenia eskapo?

... Nun ŝi sidas sur la verando de ilia hejmo en Tasmanio, apogante kontraŭ la genuo de sia patro. Kaj li promesas, “Kiam, plej baldaŭ, vi kaj mi sufiĉe aĝos, Linda, ni forflugos, ni eskapos. Du knaboj kune. Mi kaprice ŝatus ŝipe veturi laŭ rivero en Ĉinio.” Linda vidas tiun riveron, tre larĝan, kovritan per etaj flosoj kaj

boatoj. Ŝi vidas la flavajn ĉapelojn de la boatistoj; kaj ŝi aŭdas iliajn altajn malfortajn voĉojn krei. ...

“Jes, Paĉjo.”

Sed ĝuste tiam, tre larĝbrusta juna viro kun brile rufa hararo malrapide promenis preter la domo, kaj malrapide, eĉ solene ĉapele salutis. La patro de Linda, mokete tiris ŝian orelon, laŭ sia kutimo.

“La admiranto de Linda,” li flustris.

“Ho, Paĉjo, imagu geedziĝo kun Stanleo Burnell!”

Nu, ŝi ja edziniĝis al li. Kaj plue, ŝi amas al li. Ne la Stanleo, kiun ĉiu vidas, ne la ĉiutaga ulo; sed timema, sentiva, senkulpa Stanleo, kiu ĉiunokte genuiĝis por diri siajn preĝojn, kaj sopiris esti bona.

Stanleo estis simpla. Se li kredus je personoj – kiel li kredis je ŝi, ekzemple – tio estis per sia tuta koro. Li ne povis esti mallojala, li ne povis mensogi. Kaj kiel terure li suferis, se li pensis, ke iu – ŝi – ne estis profunde honesta, profunde sincera al li! “Ĉi tio estas tro subtila por mi!” Li elĵetis la vortojn, sed lia malkaŝe tremanta aflikta mieno, estis kiel la aspekto de besto en kaptilo.

Sed la problemo estis – ĉi-loke, Linda preskaŭ emis ridi, tamen Ĉielo scias, ke tio ne estas ridinda afero – ŝi tre malofte vidis *sian* imagon de Stanleo. Estis ekvidoj, momentoj, paŭzoj por spiri, de trankvilo, sed la restaĵo de la tempo estis kvazaŭ vivi en domo, kiu ne povis eviti kutimon por ekbruli, vivi sur ŝipo, kiu pereis ĉiun tagon. Kaj ĉiam estis Stanleo, kiu estis en la profundo de la danĝero. Kaj ŝi pasigis sian tutan tempon por savi lin, kaj restaŭri lin, kaj trankviligi lin, kaj aŭskulti lian rakonton. Kaj tion, kio restis el sia tempo, ŝi pasigis en timo, ke ŝi naskos bebojn.

Linda sulkigis la frunton; ŝi subite rekten eksidis en sia ferdeka seĝo kaj ekprenis siajn maleolojn. Jes, tio estis ŝia vera plendo kontraŭ vivo; estis tio, kion ŝi ne povis kompreni. Tio estis la demando, kiun ŝi faris, kaj ree faris, kaj vane aŭskultis por respondo. Estas naiva simplismo diri, ke estas la komuna sorto de virinoj, naski bebojn. Ne estas vere. Ŝi, por unu, povus pruvi, ke tio malpravas. Ŝi rompiĝis, malfortiĝis, ŝia kuraĝo foriris, pro naskado. Kaj, kio igis ĝin duoble malfacile elporti, estas, ke ŝi ne amis siajn infanojn. Estis senutile ŝajnigi. Eĉ se ŝi jam havis la forton, ŝi neniam vartus kaj ludus kun la etaj knabinoj. Ne; estis kvazaŭ, malvarma spiro ĝisfunde malvarmigis ŝin, en ĉiu el tiuj teruraj vojaĝoj; ŝi havis neniun restan varmon por doni al ili. Pri la knabo – nu, danke al Ĉielo, patrino jam prenis lin; li apartenis al patrino, aŭ al Berila, aŭ al iu ajn, kiu deziris lin. Ŝi apenaŭ tenis lin en siaj brakoj. Ŝi estis tiom indiferenta pri li, ke dum la knabo kuŝis tie ... Linda malsupren ekrigardis.

La knabo jam renversiĝis. Li kuŝis vizaĝe al ŝi, kaj li ne plu dormis. Liaj malhele bluaj infanaj okuloj estis malfermaj; ŝajnis, kvazaŭ li ŝtele rigardas sian patrinon. Kaj subite lia vizaĝo montris vangajn kavetojn; ĝi fariĝis larĝe sendenta rideto, perfekta vizaĝa brilo, neniel malpli.

“Jen mi ĉeestas!” tiu kontenta rideto ŝajnis diri. “Kial vi ne ŝatas min?”

Estis io tiom kurioza, tiom ne atendata pri tiu rideto, ke Linda mem ridetis. Sed ŝi bridis sin, kaj malvarme diris al la knabo, “Mi ne ŝatas bebojn.”

“Ne ŝatas bebojn?” La knabo ne povis kredi ŝin. “Ne ŝatas *min*?” Li stulte svingis siajn brakojn al sia patrino.

Linda malleviĝis de sia seĝo al sur la gazono.

“Kial vi daŭrigas tiun ridetadon?” ŝi severe diris. “Se vi sciis, pri kio mi pensas, vi ne ridetus.”

Sed li nur ruze kuntiris siajn okulojn, kaj rulis sian kapon sur la kapkuseno. Li ne kredis iun vorton, kiun ŝi diris.

“Ni konas ĉion pri tio!” ridetis la knabo.

Linda miris pri la memfido de ĉi tiu eta kreaĵo. ... Ho ne, estu sincera. Tio ne estis, kion ŝi sentis; tio estis io tre malsama, ĝi estis io tiel nova, tiel ... . La larmoj dancis en ŝiaj okuloj; ŝi spiris en eta flustro al la knabo, “Hola, mia amuzaĵo!”

Sed ĝis nun la knabo jam forgesis sian patrinon. Li ree serioziĝis. Io ruĝeta, io mola flirtis antaŭ li. Li provis ekprenon al ĝi, kaj ĝi tuj malaperis. Sed kiam li malstreĉe kuŝiĝis, alia kiel la unua, aperis. Ĉi-foje li estis rezoluta kapti ĝin. Li grandege klopodis kaj renverse ruliĝis.

## 7

**L**a tajdo malaltis; la strando malokupiĝis; pigre baraktis la varmeta maro. La suno malsupren batis, tien batis varme kaj fajre sur la fajnan sablon, baki la grize kaj blue kaj nigre kaj blanke vejnajn ŝtonetojn. Ĝi elsuĉis la etan guton de akvo, kiu kuŝis en la kavo de la kurbaĵoj; ĝi blankigis la ruĝetan konvolvulon, kiu tredis tra kaj tra la sablaj montetoj. Ŝajnis, ke nenio moviĝis krom la etaj sablaj talitroj. Pit-pit-pit! Ili neniam senmove restis.

Tie transe sur la trudherbaj pendaj rokoj, kiuj je malalta tajdo aspektis kiel vilaj bestoj malsupren veninte por trinki, la sunlumo ŝajne rotaciis, kiel arĝenta monero faligite en ĉiun el malgrandaj rokaj flakoj. Ili dancis. Ili tremis, kaj tre etaj krispoj lavis la porajn bordojn. Malsupren rigardi, kliniĝi, oni vidus ĉiun flakon, kiel lago kun ruĝetaj kaj bluaj domoj amase sur la bordoj; kaj ho, la vasta montara tereno preter tiuj domoj – la ravinoj, la montpasejoj, la danĝeraj riveretoj, kaj timigaj padoj, kiuj kondukis al la rando de la akvo. Sube flirtis la mara arbaro – ruĝetaj fadenaj arboj, veluraj maranemonoj, kaj trudherboj punktitaj per oranĝaj beroj. Nun ŝtono sur la fundo ŝanceliĝis, kaj jen estis ekvido de nigra palpilo; nun fadenforma estaĵo flirte pasis kaj perdiĝis. Io tiam okazis al la puncaj flirtaj arboj; ili ŝanĝiĝis al malvarme lunluma bluo. Kaj nun “pum” frapo leĝere sonis. Kiu faris tiun sonon? Kio okazas tie sube? Kaj kiel forte kiel malseke la fuko odoris en la varma suno. ...

Oni jam fermis la verdajn rulkurtenojn en la bangaloj de la somera kolonio. Trans la verandoj, sterne sur la kampo, ĵetite super la bariloj, estis lace aspektaj naĝvestoj kaj krudaj, striaj bantukoj. Ĉiu malantaŭa fenestro ŝajne havis paron de tolŝuoj, sur la fenestrobreto, kaj iujn bulojn de roko, aŭ sitelon, aŭ kolekton de konkoj de iriza halioto. La boŝo tremadis en malklareco pro varmo; la sabla vojo vakis, krom la hundo de familio Trout, Bilardo, kiu sterne kuŝis en la mezo mem de la vojo. Lia blua okulo supren turniĝis, liaj kruroj rigide elstaris, kaj li foje bojetis kun senespera sono, kvazaŭ diri, ke li decidis fari finon al ĝi, kaj nur atendis por ia afabla ĉaro alveni.

“Kion vi rigardas, mia avino? Kial vi ripete haltas kaj iel ripete rigardas la muron?”

Kezia kaj ŝia avino kune siestis. La eta knabino, portante nur sian kalsonon kaj sian korsaĵon, kun nudaj brakoj kaj gamboj, kuŝis sur unu el la pufaj

kapkusenoj de la lito de sia avino; kaj la maljunulino en blanka taŭza tualeta robo sidis en lulseĝo ĉe la fenestro, kun longa peco de ruĝeta trikaĵo en sia sino. La ĉambro, kiun ili kune okupis, same kiel la aliaj ĉambroj en la bangalo, estis el hele vernisa ligno kaj la planko estis nuda. La meblaro estis tia plej kaduka, tia plej simpla. La tualeta tablo, ekzemple, estis pakaĵa kesto en floro-branĉa muslina subjupo, kaj la spegulo supre estis tre stranga; ĝi estis, kvazaŭ peco de zigzaga fulmo enkarceriĝis en ĝi. Sur la tablo sidis kruĉo de armeriaj floroj, kunpremitaj tiom strikte, ke ili aspektis pli kiel velura kuseneto, kaj speciala konkono, kiun Kezia jam donis al sia avino por pingla pleto, kaj alia eĉ pli speciala, kiu, laŭ ŝi, estus tre bona loko, en kiu horloĝeto ekdormi.

“Diru al mi, Avinjo,” diris Kezia.

La maljunulino suspiris, volvis la lanon dufoje ĉirkaŭ sian polekson, kaj trapuŝis la ostan trikilon. Ŝi ektrikis.

“Mi pensis pri via onklo Vilhelmo, karulino,” ŝi leĝere diris.

“Mia aŭstralia onklo Vilhelmo?” diris Kezia. Ŝi havis alian.

“Jes, kompreneble.”

“Tiu, kiun mi neniam vidis?”

“Jen tiu.”

“Kio okazis al li?” Kezia perfekte bone sciis, sed ŝi volis, ke oni rediru al ŝi.

“Li iris al la orminejoj, kaj suferis sunfrapon tie kaj mortis,” diris maljuna S-ino Fairfield.

Kezia palpebrumis, kaj ŝi ree konsideris la mensan bildon ... eta viro forfalis kiel ludila soldato, ĉe la rando de granda nigra truo.

“Ĉu pensi pri li, malĝojigas vin, Avinjo?” Ŝi malamis, ke ŝia avino malĝoji.

Estis la vico de la maljunulino konsideri. Ĉu malĝojigis ŝin; rigardi malantaŭen, malantaŭen? Reen fiksrigardi tra la jaroj kiel Kezia jam vidis, ke ŝi estas farinta. Prizorgi *ilin*, kiel virino faras, longatempe post, ke *ili* estas preter vido. Ne, vivo estas tia.

“Ne, Kezia.”

“Sed kial?” demandis Kezia. Ŝi levis unu nudan brakon kaj komencis desegni bildojn en la aero. “Kial onklo Vilhelmo devis morti? Li ne estis maljuna.”

S-ino Fairfield komencis nombri la maŝojn trioje. “Ĝi simple okazis,” ŝi diris per sorbiĝa voĉo.

“Ĉu ĉiu devas morti?” demandis Kezia.

“Ĉiuj!”

“Mi?” Kezia ŝajnis timeme malkredebla.

“Iun tagon, mia karulino.”

“Sed, Avinjo.” Kezia svingis sian maldekstran kruron kaj flirtigis siajn piedfingrojn. Ili sentiĝis sabla. “Kio, se mi nur ne volos?”

La maljunulino ree suspiris kaj tiris longan fadenon el la lana bulo.

“Oni ne petas al ni, Kezia,” ŝi malĝoje diris. “Ĝi okazas al ĉiuj el ni, ĉu baldaŭ aŭ pli poste.”

Kezia kuŝis senmove, pensis pri ĉi tio. Ŝi ne volis morti. Tio signifus, ke ŝi devus forlasi ĉi tie, forlasi ĉie, por ĉiam, foriri – forlasi sian avinon. Ŝi rapide renversiĝis.

“Avinjo,” ŝi diris per konsterniĝa voĉo.

“Kio, mia dorloto!”

“*Vi ne estu mortonta.*” Kezia tre rezolute decidis.

“Ha, Kezia,” – ŝia avino levis la okulojn kaj ridetis kaj skuis sian kapon – “ni ne parolu pri ĝi.”

“Sed vi devas ne morti. Vi ne povus lasi min. Vi ne povus ne esti ĉi tie.” Ĉi tio estis terure. “Promesu al mi, ke vi neniam faros ĝin, Avinjo,” petegis Kezia.

La maljunulino daŭre trikis.

“Promesu al mi! Diru neniam!”

Sed ŝia avino ankoraŭ estis silenta.

Kezia ruliĝis el la lito; ŝi ne povis plu elporti ĝin, kaj ŝi leĝere saltis sur la genuojn de sia avino, kaj kunpremias siajn manojn ĉirkaŭ la gorĝo de la maljunulino, kaj komencis kisi ŝin, sub la mentono, malantaŭ la orelo, kaj blovi en ŝian nukon.

“Diru neniam ... diru neniam ... diru neniam –.” Ŝi anhelis inter la kisoj. Kaj tiam ŝi komencis, tre ĝentile, tre leĝere, tikli sian avinon.

“Kezia!” La maljunulino faligis sian trikaĵon. Ŝi dorsen balanciĝis en la lulseĝo. Ŝi komencis tikli al Kezia.

“Diru neniam, diru neniam, diru neniam,” gluglis Kezia, dum ili tie ridante kuŝis en la brakoj de la alia. “Nu, tio sufiĉas, mia sciuro! Tio sufiĉas, mia sovaĝa poneo!” diris maljuna S-ino Fairfield, ordigis sian ĉapon. “Relevu mian trikaĵon.”

Ili ambaŭ forgesis, pri kio la ‘neniam’ temis.

## 8

**L**a suno ankoraŭ plene brilis sur la ĝardeno, kiam la malantaŭa pordo, de la domo de familio Burnell, brue fermiĝis, kaj tre gaja figuro promenis laŭ la pado al la voja pordego. Estis Alica la servistino, vestita por feria posttagmezo. Ŝi portis blankan kotonan robon kun tiom grandaj ruĝaj punktoj kaj tiom multaj, ke ili tremigis onin, blankajn ŝuojn kaj fajnan pajlan ĉapelon laŭ Livorno, kies rando supren turna kun papavoj. Kompreneble ŝi portis gantojn, blankajn, makulajn ĉe la kroĉiloj per fera tinkturo, kaj en unu mano ŝi portis tre detruan aspektan sunombrelon, al kiu ŝi menciis kiel sia *perea-solo*.

Berila, sidis en la fenestra orielo, ventumis sian freŝe lavitan hararon, pensis, ke ŝi neniam jam vidis tian ulon. Se Alica nur jam nigrigus sian vizaĝon per peco de brulinta korko, antaŭ ol ŝi ekiris, la bildo jam estus kompleta. Kaj kien irus tia knabino en ĉi tia loko? La korforma fiĝia ventumilo malestime pulsas al tiu bele brila hararo. Ŝi supozis, ke Alica jam alprenis iun horore vulgaran petolulon, kaj ili kune foriros al la boŝo. Domaĝe, ke ŝi fariĝis tiom elstara; ili nepre diligente taskus por kaŝi sin, pro Alica en tiu pimpa vestaro.

Sed ne, Berila estis maljusta. Alica iras por trinki teon kun S-ino Stubbs, kiu jam sendis inviton per la eta knabo, kiu venas por mendoj. Ŝi ekprenis ja egan ŝaton al S-ino Stubbs, ekde kiam ŝi unue vizitis la butikon por akiri ion kontraŭ siaj moskitoj.

“Kara koro!” S-ino Stubbs jam frapis sian manon al sia flanko. “Mi neniam vidis iun tiom mordite. Vi povus esti atakita far kanibaloj.”

Tamen Alica ja esperis, ke estu pli da homa ĉeesto sur la vojo. Havi neniun malantaŭ si, igis ŝin sentiĝi stranga. Igis ŝin sentiĝi malfortika en la spino. Ŝi ne povis kredi, ke ne estis iu, kiu observis ŝin. Kaj tamen estus stulte turniĝi; tio rivelus onin. Ŝi entiris siajn gantojn, zumis al si, kaj diris al la fora eŭkalipta arbo, "Ne estos longe, nun." Sed tio apenaŭ estis kunuleco.

La butiko de S-ino Stubbs situis sur malgranda monteto tuj for de la vojo. Ĝi havis du grandajn fenestrojn por okuloj, larĝan verandon por ĉapelo, kaj la signo sur la tegmento krude skribite: **S-INO STUBBS**, estis kiel etikedo gaje fiksita en la verto de ĉapelo.

Sur la verando pendis longa sinsekvo de naĝvestoj, kune tenintaj, kvazaŭ savitaj de la maro, pli ol atendintaj por eniri maron; kaj apud ili pendis grapolo de tolŝuoj tiel nekutime intermiksita, ke por akiri paron, oni devus perforte apartigi almenaŭ kvindek el ili. Eĉ tiam, estis tre malofte trovi la maldekstran, kiu apartenis al la dekstra. Tiom multe da personoj, kies pacienco elĉerpiĝis, foriris kun unu ŝuo, kiu trafis, kaj unu tro granda. ... S-ino Stubbs fieris, ke ŝi tenis ion de ĉio. Montroj en la du fenestroj, aranĝita en formo de nestabilaj piramidoj, estis enmetitaj tiel strikte, amasigitaj tiom alte, ke ŝajnis kvazaŭ, nur iluziisto povus malebligi, ke ili ŝancele falu. En la maldekstra angulo de unu fenestro, gluita al la vitro per kvar gelatenaj lozanĝoj, estis - kaj jam estis ekde pratempo - avizo.

PERDITA ! BELA ORA BROĈO  
SOLIDA ORO  
SUR AŬ APUD STRANDO  
GRATIFIKO OFERTA

Alica puŝe malfermis la pordon. La sonorilo klake tintis, la ruĝaj serĝaj kurtenoj apartiĝis, kaj S-ino Stubbs aperis. Kun sia larĝa rideto kaj la longa larda tranĉilo en sia mano, ŝi aspektis kiel amika bandito. Alica estis tiom varme bonvenigita, ke ŝi spertis ian malfacilecon por elteni sian "ĝentilan konduton". Tio konsistis el etaj tusoj kaj hm, tiroj al ŝiaj gantoj, ordigo de ŝia jupo, kaj kurioza problemo vidi, kion oni metis antaŭ ŝi, aŭ kompreni, kion oni diris.

Oni servis teon kaj manĝon, sur la salona tablo - estis ŝinko, sardinoj, tuta duona kilogramo da butero, kaj tiom granda disko-kuko, ke ĝi ŝajnis esti reklamo por bakpulvoro. La primusa forno tiel laŭte muĝis, ke estis senutile peni paroli super ĝi. Alica sidiĝis sur la rando de korba seĝo, dum S-ino Stubbs pumpis la fornon al eĉ pli alta. Subite S-ino Stubbs fortiris kusenon de sur seĝo kaj rivelis grandan, brunpaperan pakaĵon.

"Mi ĵus jam petis preni iujn fotojn, mia kara," ŝi gaje kriis al Alica. "Diru al mi, kion vi opinias pri ili."

Per tre delikata eleganta maniero Alica malsekigis sian fingron kaj foren metis la silkopaperon de la unua. Hele-ĉiele! Kiom multe estis! Ja estis almenaŭ kvar dekoj. Kaj ŝi supren tenis ĝin en la lumo.

S-ino Stubbs sidis en fotelo, kliniĝis al unu flanko. Estis mieno de milda miro sur ŝia larĝa vizaĝo, kaj ĝi ja bone estu. Ĉar, kvankam la fotelo staris sur tapiŝo, al ĝia maldekstro, mirakle sen tuŝi la tapiŝan randon, estis vigla akvofalo. Al ŝia dekstro staris greka kolono kun giganta filika arbo ĉe ĉiu flanko de ĝi, kaj en la

fono marasma monto ture altis, pala pro neĝo.

“Ĝi estas agrabla stilo, ĉu ne?” kriis S-ino Stubbs; kaj Alica ĵus kriis, “Dolĉe,” kiam la muĝo de la primusa forno malkreskis, siblis, ĉesis, kaj ŝi diris “Bela” en silento, kiu estis timiga.

“Altiro vian seĝon, mia kara,” diris S-ino Stubbs, komencis elverŝi teon. “Jes,” ŝi penseme diris, dum ŝi transdonis la teon, “sed mi ne ŝatas la grandon. “Mi havigos pligrandiĝon. Sufiĉas por kristnaskaj kartoj, sed malgrandaj fotoj neniam plaĉis al mi. Oni gajnas nenian komforton el ili. Por diri la veron, mi trovas ilin senkuraĝigaj.

Alica tute komprenis, kion ŝi volis diri.

“Grando,” diris S-ino Stubbs. “Donu al mi grandon. Tio estas, kion mia kompatinda kara edzo ĉiam diris. Li ne povis toleri ion malgrandan. Maltrankviligis lin. Kaj, malgraŭ ke ŝajnas strange, mia kara,” – ĉi tie S-ino Stubbs knaris kaj ŝajnis kreski pro la memoro – “estis hidropso, kiu fine forportis lin. Estas multfoje, ke oni ĉerpis preskaŭ litron el li ĉe la hospitalo. ... Tio ŝajnis esti juĝo..”

Alica arde deziris precize scii, kion oni ĉerpis el li. Ŝi sugestis, “Mi supozas, ke estis akvo.”

Sed S-ino Stubbs fiksas siajn okulojn al Alica, kaj signife respondis, “Ĝi estis *likvaĵo*, mia kara.”

Likvaĵo! Alica saltis for de la vorto kiel kato, kaj revenis al ĝi, naze provi kaj singarde.

“Jen tiu estas li,” diris S-ino Stubbs kaj ŝi drame fingre montris foton kun granda laŭ realo de kapo kaj ŝultroj de solida viro kun velka blanka rozo en la butontruo de sia jaketo, kio pensigas onin pri kurbo de malvarma ŝafa graso. Tuj sube, en arĝentaj literoj sur ruĝa kartona fono, estis la vortoj, “Ne estu timema, estas mi.”

“Ĝi ja estas tiel brava vizaĝo,” leĝere diris Alica.

La pale blua banto tremis, sur la supro de la krispa blonda hararo de S-ino Stubbs. Ŝi arkigis sian dikan kolon. Kian kolon ŝi havis! Ĝi estis brile ruĝeta, kie ĝi komenciĝis kaj tiam ŝanĝiĝis al varmete abrikota koloro kaj tio paliĝis al koloro de bruna ovo kaj tiam al profunde krema koloro.

“Tute same, mia kara,” ŝi surprize diris, “libero estas plej bona!” Ŝia milde klukanta rido sonis kiel ronrono. “Libereco estas plej bona,” ŝi ree diris.

Libero! Alica stulte ete subridis. Ŝi sentiĝis embarasita. Ŝia menso flugis reen al ŝia propra kuirejo. Tre ege strange! Ŝi volis ree esti tie en ĝi.

## 9

**S** tranga kompanio kuniĝis post vespermanĝo en la vestlaveja dometo, de familio Burnell. Ĉirkaŭ la tablo estis virbovo, virkoko, azeno, kiu ripete forgesis, ke ĝi estas azeno, ŝafo kaj abelo. La vestlaveja dometo estis la perfekta loko por tia kunveno, ĉar ili povis brui tiom, kiom ili deziras, kaj neniu iam ajn interrompis. Ĝi estis malgranda onde ferlada ŝedo, kiu staris aparte de la bangalo. Kontraŭ la muro estis profunda trogo, kaj en la angulo estis kupra lavujo, kun korbo de vestaj pinĉiloj sur ties supro. La eta fenestro, kovrita per reto de araneaĵoj, havis pecon de kandelo kaj musan kaptilon sur la polva

fenestra breto. Estis sekigaj ŝnuroj, kiuj supre kruciĝis kaj pendis de mura kroĉilo; estis tre granda vere grandega, rusta huffero. La tablo estis en la centro kun benko ĉe ĉiu flanko.

“Vi ne povas esti abelo, Kezia. Abelo ne estas besto. Ĝi estas insekto.”

“Ho, sed mi ja volas treege esti abelo,” plende blekis Kezia. ... Eta abelo, ĉie flave mole-hara, kun striaj kruroj. Ŝi metis siajn krurojn sub sin kaj kliniĝis trans la tablo. Ŝi sentiĝis, ke ŝi estas abelo.

“Insekto devas esti besto,” ŝi firme diris. “Ĝi faras sonon. Ĝi ne similas fiŝon.”

“Mi estas bovo, mi estas bovo,” kriis Filipino. Kaj li sonigis tiom tremigan muĝadon – kiel li faris tiun bruon? – ke Ĉarlota ŝajnis iom konsterniĝi.

“Mi estos ŝafo,” diris malgranda Ĉifono. “Tuta aro de ŝafoj preterpasis ĉi-matene.”

“Kiel vi scias?”

“Paĉjo aŭdis ilin. ‘Be!’” Li sonis kiel eta ŝafido, kiu poste trovas, kaj, kiu sonas kvazaŭ, ĝi volas portiĝi.

“*Kokeriko!*” akre kriis Isabela. Kun siaj ruĝaj vangoj kaj brilaj okuloj ŝi aspektis kiel virkoko.

“Kio mi estu?” Ĉarlota demandis al ĉiuj, kaj ŝi sidis tie ridetante, atendante ĝis ili decidus por ŝi. Ĝi devas esti facila besto.

“Estu azeno, Ĉarlota.” Ĝi estis propono far Kezia. “*Hi-ho!* Vi ne povas forgesi tion.”

“*Hi-ho!*” solene diris Ĉarlota. “Kiam mi devas diri ĝin?”

“Mi klarigos, mi eksplikos,” diris la bovo. Estis li, kiu posedis la kartojn. Li svingis ilin ĉirkaŭ sia kapo. “Ĉiuj silentu! Ĉiuj aŭskultu!” Kaj li atendis por ili. “Rigardu ĉi tien, Ĉarlota.” Li renversis karton. “Ĝi havas du punktojn sur ĝi – komprenu? Nu, se vi metos tiun karton en la centron kaj iu alia ankaŭ havas karton kun du punktoj, vi diru ‘*Hi-ho*’ kaj la karto estos via.”

“La mia?” La okuloj de Ĉarlota estis rondaj. “Por reteni?”

“Ne, multe-stulte. Nur por la ludo, komprenu? Nur dum ni ludas.” La bovo koleris al ŝi.

“Ho, Ĉarlota, vi *ja* estas eta stultulo.” diris la fiera virkoko.

Ĉarlota rigardis ambaŭ el ili. Tiam ŝi pendigis sian kapon; ŝia lipo tremis. “Mi ne volas ludi,” ŝi flustris. La aliaj ekrigardis, iu la alian, kiel konspirantoj. Ĉiuj konis la signifon de tio. Ŝi forirus kaj troviĝus ie, stari kun sia antaŭtuko ĵetite super sian kapon, en angulo, aŭ kontraŭ muro, aŭ eĉ malantaŭ seĝo.

“Jes, vi *ja* volas, Ĉarlota. Estas tre facile,” diris Kezia.

Kaj Isabela, pente diris, precize kiel plenkreskulo, “Observu *min*, Ĉarlota, kaj vi baldaŭ lernos.”

“Gajiĝu, Ĉarlota,” diris Filipino. “Nu, mi scias kion mi faros. Mi donos al vi la unuan. Ĝi vere estas mia, sed mi donos ĝin al vi. Jen ĝi por vi. Kaj li malsupren frape metis la karton antaŭ Ĉarlota.

Ĉarlota reviviĝis pro tio. Sed nun ŝi trafis alian malfacilon. “Mi ne havas poŝtukon,” ŝi diris; “Mi ankaŭ ege bezonas iun.”

“Jen, Ĉarlota, vi rajtas uzi mian.” Ĉifono ĉerpis en sian maristan ĉemizon kaj eltiris tre malseke aspektan poŝtukon, kun nodo. “Tre atentu,” li avertis ŝin.

“Uzu nur tiun angulon. Ne malligu la nodon. Mi ene havas etan asterion, kiun mi provos malsovaĝigi.”

“Ho, ek, vi knabinoj,” diris la bovo. “Kaj atentu – vi ne rigardu viajn kartojn. Vi devas reteni viajn manojn sub la tablo, ĝis kiam mi diros ‘Komencu’.”

Oni klake disdonis la kartojn ĉirkaŭ la tablo. Ili zorge provis ekvidi kiajn kartojn, sed Filipo tro rapidis por ili. Estis tre ekscitiĝe, sidi tie en la vestlaveja dometo; Nur kun peno, ke ili ne burĝonis al eta ĥoro de bestoj, antaŭ ol Filipo finis disdoni.

“Nu, Ĉarlota, vi komencu.”

Ĉarlota timeme etendis manon, prenis la supran karton de sia pako, atente rigardis ĝin – estis klare, ke ŝi nombras la punktojn – kaj malsupren metis ĝin.

“Ne, Ĉarlota, vi ne rajtas fari tion. Vi devas ne unue rigardi ĝin. Vi devas turni ĝin al la alia flanko.”

“Sed tiam ĉiuj vidos ĝin en la sama tempo kiel mi,” diris Ĉarlota.

La ludo daŭris. “*Mu-mu!*” La bovo terure muĝis. Li sturmis trans la tablon kaj ŝajne formanĝis la kartojn.

“*Bzz!*” zumis la abelo.

“*Kokeriko!*” Isabela stariĝis en sia ekscitiĝo kaj movis siajn kubutojn kiel flugiloj.

“*Be!*” Ĉifono demetis la Reĝon de Karooj, kaj Ĉarlota demetis tiun, kiun ŝi nomis, Reĝon de ‘Pikiloj’. Ŝi reste havis apenaŭ iun ajn karton.

“Kial vi ne ekkrias, Ĉarlota?”

“Mi forgesis, kio mi estas,” mizere diris la azeno.

“Nu, ŝanĝu! Estu hundo, anstataŭe! Ĝi bojas ‘*ruf-ruf!*’”

“Ho, jes. Tio estas *multe* pli facile.” Ĉarlota ree ridetis. Sed kiam kaj ŝi, kaj Kezia, havis unu-punktan karton, Kezia intence atendis. La aliaj signis al Ĉarlota, kaj fingre montris ĝin. Ĉarlota tre ruĝiĝis; ŝi mienis perplekse, kaj finfine ŝi diris “*Hi-ho!* Kezia.”

“ŜŜ! Atendu minuton!” Ili estis en la vera mezo de ludado, kiam la bovo haltigis ilin, levante la manon. “Kio tio estas? Kio estas tiu bruoj?”

“Kiu bruoj? Kion vi volas diri?” demandis la virkoko.”

“ŜŜ! Fermu la buŝon! Aŭskultu!” Ili estis muse senmovaj. “Mi pensis, ke mi aŭdis iun – iun specon de frapado,” diris la bovo.

“Kia ĝi estis?” milde demandis la ŝafo.

Neniu respondo.

La abelo ekstremis. “Kial ajn ni fermis la pordon?” ŝi leĝere diris. Ho, kial, kial ili jam fermis la pordon?

Dum ili ludis, la tago jam paliĝis; la belega sunsubiro jam flamis kaj mortis. Kaj nun la rapida malhelo kuris trans la maron, super la sablaj montetoj, supren laŭ la kampo. Oni timis rigardi en la angulojn de la vestlaveja dometo, tamen oni devis zorge provi rigardi. Kaj ie, malproksime, Avinjo lumigis lampon. Oni malsupren tiris la rulkurtenojn; la kuireja fajro spegule saltis en la ladskatoloj sur la kamenbreto.

“Estus terure nun,” diris la bovo, “se araneo falus de la plafono sur la tablon; ĉu ne?”

“Araneoj ne falas de plafonoj.”

“Jes, ili ja falas. Nia Minja diris al ni, ke ŝi vidis araneon, tiom granda kiom subtaso, kun longaj haroj kiaj sur grosa.”

Rapide, ĉiuj la etaj kapoj supren skuiĝis; ĉiuj la etaj korpoj kuntiriĝis, kunpremiĝis.

“Kial neniu venas, kaj vokas nin?” kriis la virkoko.

Ho, tiuj plenkreskuloj, ridante kaj komforte, sidante en la lampa lumo, trinkante el tasoj! Tiuj jam forgesis pri ili. Ne, ili ne vere forgesis. Tio estis la signifo de ilia rideto. Tiuj jam decidis lasi ilin resti tie sole.

Subite Ĉarlota tiel pike kriĉis, ke ili ĉiuj saltis de la benkoj, ili ĉiuj ankaŭ kriĉis. “Vizaĝo – vizaĝo rigardu!” ŝrikis Ĉarlota.

Estis vera, estis reala. Preme kontraŭ la fenestro estis pala vizaĝo, nigraj okuloj, nigra barbo.

“Avinjo! Panjo! Iu ajn!”

Sed ili jam ne atingis la pordon, iuj falis sur aliajn, ĝis kiam malfermis la pordon onklo Jonatano. Li venis por hejmen konduki la etajn knabojn.

## 10

**L**i intencis pli frue esti tie, sed ĉe la antaŭa ĝardeno li renkontiĝis kun Linda, kiu promenis tien kaj reen sur la gazono, kaj haltis por for pluki mortintan nanan dianton, aŭ doni apogilon al peze kariofila dianto, aŭ por preni profundan enspiron de io, kaj tiam ree daŭre promeni, kun sia mieno de emo por apartiĝi. Sur sia blanka robo ŝi portis flavan punce-frandan ŝalon el la butikoj de la ĉino.

“Hola, Jonatano!” vokis Linda. Kaj Jonatano forprenis sian kadukan panaman ĉapelon, premis ĝin kontraŭ sia brusto, malleviĝis al unu genuo, kaj kisis la manon de Linda.

“Saluton, mia favora ulino! Saluton, mia ĉiele persika floro!” la basa voĉo leĝere tondris. “Kie troviĝas la aliaj noblaj damoj?”

“Berila estas for por ludi briĝon, kaj patrino prizorgas banon por la bebo. ... Ĉu vi venis por pruntepreni ion?”

La familio Trout ege ofte elĉerpiĝis de aĵoj kaj en lasta momento petis al familio Burnell.

Sed Jonatano nur respondis, “Iom da amo, iom da afableco,” kaj li promenis ĉe la flanko de sia bofratino.

Linda malleviĝis en la hamakon de Berila sub la manuka arbo, kaj Jonatano etendis sin sur la gazono apud ŝi, tiris longan tigon kaj komencis maĉi ĝin. Ili bone konis, ĉiu la alian. La voĉoj de infanoj kriis el la aliaj ĝardenoj. La malpeza ĉaro de la fiŝisto ŝanceliĝis laŭ la sabla vojo, kaj el malproksime, ili aŭdis bojadon de hundo; ĝi sonis obtuze, kvazaŭ la hundo havis sian kapon en sako. Se oni aŭskultus, oni povus apenaŭ aŭdi la molan susuron de la maro, kiu dum plena tajdo balais la ŝtonetojn. La suno estis sinkanta.

“Kaj do, vi reiros al la oficejo en lundo, ĉu, Jonatano?” demandis Linda.

“En lundo la kaĝa pordo malfermiĝas, kaj sonore fermiĝas kontraŭ la viktimo por plue dek-unu monatoj plus semajno,” respondis Jonatano.

Linda iomete ŝancelis sin, "Tio devas esti terura," ŝi malrapide diris.

"Ĉu vi preferus, ke mi ridu, mia favora fratino? Ĉu vi preferus, ke mi ploru?"

Linda tiom kutimis al la maniero de esprimi far Jonatano, ke ŝi ne atentis al tio.

"Mi supozas," ŝi malprecize diris, "ke oni kutimiĝas al ĝi. Oni kutimiĝas al io ajn."

"Ĉu oni ja? Hm!" La 'Hm' estis tiom profunda, ke ĝi ŝajne tondris el sub la tero. "Mi miras, kiel oni faras tion," Jonatano meditis; "mi neniam sukcesis."

Rigardante lin dum li kuŝis tie, Linda denove pensis, kiel bonaspekta li estas. Estis strange pensi, ke li estas nur ordinara komizo, ke Stanleo gajnas duoblan monon kiom li. Kio misas pri Jonatano? Li havis nenian ambicion; ŝi supozis, ke tio trafas. Kaj tamen oni kredis, ke li estas talenta, neordinara. Li pasie amis muzikon; ĉiu disponebla monero, kiun li havis, aĉetis librojn. Li ĉiam estis plena de novaj ideoj, projektoj, planoj. Sed nenio disvolviĝis el ĉio tio. La nova fajro flamis en Jonatano; vi preskaŭ aŭdis ĝin leĝere muĝi, dum li klarigis, priskribis kaj vastigis pri la nova afero; sed post momento ĝi kolapsis kaj nenio restis krom cindroj, kaj Jonatano kondukis kun mieno kiel ŝato en siaj nigraj okuloj. En tiuj tempoj li troigis sian absurdan manieron de parolo, kaj li kantis en la preĝejo - li estris la ĥoron - per tia time drama intenso, ke la plej humila himno surmetis malsanktan pompon.

"Ŝajnas al mi egale idiote, egale infere, devi iri al la oficejo en lundo," diris Jonatano, "kiel tio ĉiam estis, kaj ĉiam estos. Pasigi ĉiujn plej bonajn jarojn de onia vivo, sidante sur tabureto, tage de la naŭa ĝis la dek-sepa horo, grati en ies kontlibro! Estas kurioza uzo de onia ... unu kaj sola vivo, ĉu ne? Aŭ, ĉu mi tenere revas?" Li renversiĝis sur la gazono, kaj supren rigardis al Linda, "Diru al mi; kio estas la diferenco inter mia vivo kaj tio de ordinara prizonulo? La sola diferenco, kiun mi povas imagi, estas, ke mi metis min en karcero kaj neniu, iam ajn, ellasos min. Tio estas pli netolerebla situacio ol la alia. Ĉar, se mi jam estus - tien puŝita, kontraŭ mia volo - eĉ piedfrapante - kiam la pordo estus ŝlosita, aŭ almenaŭ post kvin jaroj aŭ iom, mi eble akceptus la fakton, kaj komencus interesiĝi pri la flugado de muŝoj, aŭ kalkulado de paŝoj far la gardisto laŭ la koridoro, kun specifa atento al variaĵoj de tretado, kaj tiel plu. Sed, kiel estas, mi similas insekton, kiu jam propravole flugas en ĉambron. Mi impetas kontraŭ la muroj, impetas kontraŭ la fenestroj, frapas kontraŭ la plafono, faras ĉion sur dia tero, efektive, krom ree elflugi. Kaj dum la tuta tempo mi pensas kiel tiu tineo, aŭ papilio, aŭ kio ajn ĝi estas, 'La mallongeco de vivo! La mallongecon de vivo!' Mi havas nur unu nokton aŭ unu tagon, kaj ekzistas ĉi tiu vasta danĝera ĝardeno, atendi tie ekstere, ne trovita, ne esplorita."

"Sed, se vi tiel sentiĝas, kial - " Linda rapide komenciĝis.

"Ha!" kriis Jonatano. Kaj tiu 'ha' iel estis preskaŭ jubile. "Tie vi trafas min. Kial? Ja kial? Jen la freneziga, mistera demando. Kial mi ne ree flugas el la ĉambro? Jen la fenestro aŭ la pordo aŭ kio ajn, per kiu mi envenis. Ĝi ne estas senespere fermita - ĉu? Kial ni ne trovu ĝin kaj foriru? Respondu al tio, mia eta fratino." Sed li ne lasis al ŝi tempon por respondi.

"Mi precize estas denove kiel tiu insekto. Pro ia kialo" - Jonatano paŭzis inter la vortoj - "ne estas lasate, estas malpermesate, estas kontraŭ insekta leĝo, ke

ĝi ĉesi batadon kaj frapadon kaj rampadon sur la vitro eĉ dum momento. Kial mi ne forlasos la oficejon? Kial mi ne serioze konsideras, ĉi-momente ekzemple, kio estas, ke malebligas min forlasi? Ne estas kvazaŭ mi estis treege ligita. Mi havas du filojn, por kiuj mi provizas, sed malgraŭ ĉio, ili estas knaboj. Mi povus foriri por fariĝi maristo, aŭ akiri laboron en la norda kamparo, aŭ – ” Subite li ridetis al Linda kaj diris en ŝanĝita voĉo, kvazaŭ li konfidis sekreton, “Malfortike ... malfortike. Neniu rezista elteno. Neniu ankro. Neniu gvida principo, ni nomu ĝin.” Sed tiam la malhele velura voĉo elruliĝis:

“Ĉu ci aŭdu la rakonton  
Kiel ĝi elvolvas sin ... ”

kaj ili estis silentaj.

La suno jam subiris. En la okcidenta ĉielo estis grandaj amasoj da kunpuŝitaj rozkoloraj nuboj. Larĝaj faskoj de lumo brilis tra la nuboj kaj preter ilin, kvazaŭ ili kovrus la tutan ĉielon. Supre la bluo paliĝis, ĝi turniĝis al pale ora, kaj la boŝo, siluetiĝi kontraŭ ĝi, glimis malhele kaj spegule kiel metalo. Foje, kiam tiuj faskoj de lumo montriĝas en la ĉielo, ili estas tre imponaj. Ili memorigas onin, ke tie supre sidas Jehovo, la ĵaluza Dio, la Ĉiopova; ... kies okulo estas sur vi, ĉiam atenta, neniam laca. Oni memoras, ke, je Lia alveno, la tuta mondo skuiĝos al unu ruina tombejo; la malvarmaj brilaj anĝeloj pelos onin tien kaj reen, kaj tempo ne ekzistos por klarigi tion, kion oni povus tiom simple klarigi. ... Sed ĉi-vespere ŝajnis al Linda, ke estis io senfine ĝoja kaj ama en tiuj arĝentaj faskoj de lumo. Kaj nun neniu sono venis de la maro. Ĝi leĝere spiris kvazaŭ ĝi tirus tiun teneran ĝojan belecon en sian propran sinon.

“Ĉio malĝustas, ĉio malĝustas,” venis la fantoma voĉo de Jonatano. “Ne estas la sceno, ne estas la lokalo, por ... tri taburetoj, tri pupitroj, tri inkujoj kaj drata kurteno.”

Linda sciis, ke li neniam ŝanĝiĝos, sed ŝi diris, “Ĉu estas tro malfrue, eĉ nun?”

“Mi estas maljuna – mi aĝas,” tonigis Jonatano. Li kliniĝis al ŝi, li pasigis sian manon trans sian kapon. “Rigardu!” Lia nigra hararo estis ĉie punktita per arĝento, kiel la brusta plumaro de nigra kokino.

Linda surpriziĝis. Ŝi tute ne sciis, ke li griziĝas. Tamen, dum li stariĝis apud ŝi, kaj suspiris kaj etendis sin, ŝi vidis lin, por la unua fojo, ne rezoluta, ne brava, ne senĉagrena, sed jam tuŝita per aĝo. Li aspektis tre alta sur la mallumiĝanta gazono, kaj la penso tuŝis ŝian menson, “Li estas kiel nura herbo.”

Jonatano ree kliniĝis kaj kisis ŝiajn fingrojn.

“Ĉielo gratifiku al cia dolĉa pacienco, damo mia,” li murmuris. “Mi devas iri serĉi tiujn heredontojn de mia renomo kaj riĉaĵo. ...” Li malaperis.

## 11

**L**umo brilis tra la fenestroj de la bangalo. Du kvadrataj makuloj de orkoloro falis sur la dantoj kaj la pintaj kalenduloj. Flora, la kato, elvenis al la verando, kaj sidis sur la supra ŝtupo, siaj blankaj piedoj kune, la vosto ĉirkaŭ volvita. Ŝi aspektis kontenta, kvazaŭ ŝi jam plentage atendis ĉi tiun momenton.

“Danko sen manko, jam malfruas,” diris Flora. “Danko sen manko, la longa tago jam finiĝas.” Ŝiaj prune verdaj okuloj malfermiĝis.

Nun oni aŭdis la muĝadon de la diliĝenco, la knalo de la vipo de Kelly. Ĝi venis sufiĉe proksime, ke oni aŭdu la voĉojn de la viroj el la urbo, kune laŭte parolante. Ĝi haltis, ĉe la pordego de familio Burnell.

Stanleo promenis duone laŭ la pado, antaŭ ol li trafis vidon de Linda. “Ĉu estas vi, karulino?”

“Jes, Stanleo.”

Li saltis trans la floran bedon, kaj kaptis ŝin en siaj brakoj. Ŝi volviĝis en tiu konata, avida, forta ĉirkaŭpremo.

“Pardonu min, karulino, pardonu min,” balbutis Stanleo, kaj li metis sian manon sub ŝian mentonon, kaj levis ŝian vizaĝon al si.

“Pardonu vin?” ridetis Linda. “Sed pro kio ajn?”

“Dolĉa Dio! Vi ne povas jam forgesi,” diris Stanleo Burnell. “Mi pensis pri nenio alia, plentage. Mi pasigis inferan tagon. Mi decidiĝis, ke mi elkuru por telegrafi, kaj tiam pensis, ke la telegramo eble ne atingos vin, antaŭ ol mi. Mi estis en torturo, Linda.”

“Sed Stanleo,” diris Linda, “pro kio mi devas pardoni vin?”

“Linda!” – Stanleo tre vundiĝis – “ĉu vi ne konsciis – vi devis jam konscii – ke mi foriris sen adiaŭi vin ĉi-matene? Mi ne povas imagi, kiel mi povis iel fari tion. Mia damna koleremo, kompreneble. Sed – nu,” – kaj li suspiris, kaj reprenis ŝin en siaj brakoj – “mi hodiaŭ sufiĉe suferis pro tio.”

“Kio estas tio, kion vi havas en via mano?” demandis Linda. “Novaj gantoj? Lasu min vidi.”

“Ho, nur malkara paro de ŝame ledaj eroj,” humile diris Stanleo. “Mi rimarkis, ke Bell surhavis paron, ĉi-matene en la diliĝenco, do, kiam mi pasis la butikon, mi enkuris kaj akiris paron por mi mem. Pri kio vi ridetas? Vi ne opinias, ke estis malĝuste por mi, ĉu?”

“Tute *male*, karulo,” diris Linda, “mi kredas, ke estis plej prudente.”

Ŝi tiris unu el la grandaj palaj gantoj sur siajn proprajn fingrojn kaj rigardis sian manon, turni ĝin tien kaj ĉien. Ŝi ankoraŭ ridetis.

Stanleo volis diri, “Mi pensis pri vi la tutan tempon, kiam mi aĉetis ilin.” Estis la vero, sed pro iu kialo li ne povis diri ĝin. “Ni eniru,” diris li.

## 12

**K**ial oni nokte sentiĝas tiom malsama? Kial estas tiom ekscite, esti veka, kiam ĉiuj dormas? Malfrue – estas tre malfrue! Tamen ĉiumomente oni sentiĝas pli kaj pli vekema, kvazaŭ oni malrapide, preskaŭ kun ĉiu spiro, vekiga al nova, mirinda, multe pli entuziasmiga kaj ekscita mondo ol la tagluma. Kaj kio estas ĉi tiu stranga sento, ke oni estas konspiranto? Leĝere, ŝteliĝe, oni moviĝas ĉirkaŭ sia ĉambro. Oni prenas ion de la tualeta tablo kaj remetas ĝin sen sono. Kaj ĉio, eĉ la lita fosto, konas onin, respondas, partoprenas oniajn sekretojn. ...

Oni ne tre ŝatas sian ĉambron dum taga tempo. Oni neniam pensas pri tio. Oni estas en ĝi kaj ekstere, la pordo malfermiĝas kaj brue fermiĝas, la ŝranko knaras. Oni sidiĝas sur la flanko de la lito, ŝanĝas siajn ŝuojn kaj ree hastas eksteren. Impeti al la spegulo, du pingloj en la hararo, pudri la nazon, kaj ree foriras. Sed nun – subite ĝi estas kara al vi. Ĝi estas karula eta amuza ĉambro.

Ĝi estas onia. Ho, kia plezuro posedi aferojn! La mia – mia propra!

“Mia vere propra por ĉiam?”

“Jes!” Iliaj lipoj kuniĝis.

Ne, kompreneble, tio estis sen rilato al ĝi. Tio estis absurdaĵo, kaj rubaĵo. Sed malgraŭ si mem, Berila vidis, tiel klare, du personojn stari en la centro de sia ĉambro. Ŝiaj brakoj estis ĉirkaŭ lia nuko; kaj li tenis ŝin. Kaj nun li flustris, “Mia belulino, mia eta belulino!” Ŝi saltis de sia lito, kuris trans al la fenestro kaj genuis sur la fenestra benko, kun siaj kubutoj sur la fenestra sojlo. Sed la bela nokto, la ĝardeno, ĉiu arbusto, ĉiu folio, eĉ la blankaj palisoj, eĉ la steloj, ankaŭ estis konspirantoj. Tiom brila estis la luno, ke la floroj estis brilaj kiel per taga tempo; la ombro de la tropeoloj, ravaj liliformaj folioj kaj plene malfermaj floroj, kuŝis trans la arĝenta verando. La manuka arbo, klinita far la sudaj ventoj, estis kiel birdo sur unu gambo, etendante flugilon.

Sed, kiam Berila rigardis la boŝon, ŝajnis al ŝi, ke la boŝo estis malgaja.

“Ni estas mutaj arboj, supren etendante dum la nokto, petegante kion, ni ne scias,” diris la ĉagrenita arbo.

Estas vere, kiam oni estas sola kaj oni pensas pri vivo, ke oni estas malgaja. Ĉiom el tiu ekscito kaj tiel plu, havas manieron por subite forlasi onin, kaj estas kvazaŭ, en la silento, iu vokis ies nomon, kaj oni aŭdis sian nomon por la unua fojo. “Berila!”

“Jes, mi estas ĉi tie. Mi estas Berila. Kiu vokas min?”

“Berila!”

“Lasu min veni.”

Estas solece, vivi sen aliulo. Kompreneble, ekzistas parencoj, amikoj, amasoj da ili; sed tio ne estas, kion ŝi intencis diri. Ŝi deziras iun, kiu sciiĝos pri tiu Berila, kiun neniu el ili konas, kiu anticipos, ke ŝi ĉiam estos tiu Berila. Ŝi deziras amanton.

“Prenu min for de ĉiuj tiuj aliaj personoj, mia amanto. Ni iru tre malproksimen. Ni pasigu nian vivon, tute freŝe, tute nia, de la komenco mem. Ni faru nian fajron. Ni sidiĝu por kune manĝi. Ni longe parolu en la nokto.”

Kaj la penso preskaŭ estis, “Savu min, mia amanto. Savu min!”

... “Ho, ek! Ne estu prudulino, mia kara. Vi amuzu vin dum vi estas juna. Tio estas mia konsilo.” Kaj alta impeto de stulta ridado kuniĝis al la laŭte apatia heno de S-ino Henriko Kember.

Vi komprenu; estas tiel amare malfacile, kiam oni havas neniun. Oni estas tiom submetita al la kompatato de aferoj. Oni ne povas nur esti malĝentila. Kaj oni ĉiam havas ĉi tiun hororon, por ŝajni sensperta kaj pompa kiel la aliaj simpluloj ĉe Lunarka Plaĝo. Kaj – kaj estas fascine scii, ke oni havas la potencon super personoj. Jes, tio estas fascine. ...

Ho kial, ho kial ‘li’ ne baldaŭ venos?

Se mi ankoraŭ loĝos ĉi tie, pensis Berila, io ajn eble okazos al mi.

“Sed kiel vi scias, ke li iel ajn venos?” mokis eta voĉo interne de ŝi.

Sed Berila malakceptis ĝin. Ŝi ne povus esti ellasita. Aliaj personoj eble, sed ne ŝi. Ne estis eble imagi, ke Berila Fairfield neniam edziniĝus, tiu aminda fascina fraŭlino.

“Ĉu vi memoras pri Berila Fairfield?”

“Memori ŝin! Kvazaŭ mi povus forgesi ŝin! Estis en unu somero ĉe Lunarka Plaĝo, ke mi vidis ŝin. Ŝi staris sur la strando en blua,” – ne, ruĝete – “muslina robo, tenante al granda kremkolora” – ne, nigre – “pajla ĉapelo. Sed nun, tio estas antaŭ jaroj.”

“Ŝi estas tiel bela kiel iam ajn, eĉ pli se iel alia.”

Berila ridetis, mordis sian lipon, kaj spektis spektadis super la ĝardeno. Dum ŝi spektis, ŝi vidis iun, viron forlasi la vojon, paŝi laŭ la kampo apud iliaj palisoj kvazaŭ li venas rekte al ŝi. Ŝia koro batis. Kiu tiu estas? Kiu, tiu povus esti? Tiu ne povus esti ŝtelisto el domoj, certe ne ŝtelisto, ĉar li fumas kaj li leĝere promenas. La koro de Berila saltis; ĝi ŝajnis renversiĝi, kaj tiam halti. Ŝi rekonis lin.

“Bonan vesperon, Fraŭlino Berila,” la voĉo kviete diris.

“Bonan vesperon.”

“Ĉu vi ne venos por eta promeno?” ĝi trene parolis.

Venu por promeno – en tiu tempo de la nokto! “Mi ne povus. Ĉiu estas en sia lito. Ĉiuj dormas.”

“Ho,” la voĉo leĝere diris, kajodoro de dolĉa cigareda fumo atingis ŝin. “Kio gravas pri ĉiuj? Ja venu! Estas tia delikata vespero. Estas neniu homo ĉirkaŭe.”

Berila kapneis. Sed jam io vekiĝis en ŝi, io levis sian kapon.

La voĉo diris, “Vi timas?” Ĝi mokis, “Kompatinda eta knabino!”

“Tute ne,” diris ŝi. Dum ŝi parolis, tiu malfortika aĵo interne de ŝi, ŝajne malvolviĝis, por kreski al grandege fortika; ŝi sopiris iri!

Kaj ĝuste kvazaŭ tio estis tute komprenata far la alia, la voĉo diris, milde kaj leĝere, sed fine, “Kune venu!”

Berila paŝis super sia malalta fenestra sojlo, transiris la verandon, kuris laŭ la gazono al la pordego. Li estis tie antaŭ ŝi.

“Tio estas ĝusta,” spiris la voĉo, kaj ĝi ŝerce moketis, “Vi ne timas, ĉu? Vi ne estas timiĝa?”

Ŝi ja estis; nun, ke ŝi estis tie, ŝi timegis, kaj ŝajnis al ŝi, ke ĉio estis malsama. La luna lumo fiksrigardis kaj scintilis; la ombroj estis kiel stangoj de fero. Io prenis ŝian manon.

“Tute ne,” ŝi leĝere diris. “Kial mi estu?”

Io milde trenis ŝian manon, tiris ĝin. Ŝi retenis sin.

“Ne, mi ne plu venos,” diris Berila.

“Ho, rubaĵo!” Henriko Kember ne kredis ŝin. “Kune venu! Ni iros nur ĝis tiu fukcia arbusto. Kune venu!”

La fukcia arbusto estis alta. Ĝi falis trans la barilon kiel duŝo. Estis eta kavo de mallumo sub ĝi.

“Ne, vere, mi ne volas,” diris Berila.

Dum momento Henriko Kember ne respondis. Tiam li venis proksimen al ŝi, turniĝis al ŝi, ridetis kaj rapide diris, “Ne estu stulta! Ne estu stulta!”

Lia rideto estis io, kion ŝi neniam antaŭe vidis. Ĉu li ebriis? Tiu brila, blinda, timiga rideto frostigis ŝin pro hororo. Kion ŝi faras? Kiel ŝi jam alvenis tien? La severa ĝardeno demandis al ŝi, dum la pordego puŝiĝis malferme, kaj tiom

rapide kiam kato, Henriko Kember travenis kaj ekprenis ŝin al li.

“Malvarma eta diablo! Malvarma eta diablo!” diris la malama voĉo.

Sed Berila estis forta. Ŝi glitis, ekkaŭris, tordis sin libera.

“Vi estas fia, fia,” diris ŝi.

“Do, kial en la nomo de Dio, vi venis?” balbutis Henriko Kember.

Neniu respondis al li.

### 13

**N**ubo, eta, serena, flosis trans la luno. En tiu momento de mallumo la maro sonis profunda, ĉagrenita. Tiam la nubo flosis for, kaj la sono de la maro estis obtuza murmuro, kvazaŭ ĝi vekigis el malluma sonĝo. Ĉio estis kvieta.

-----